

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 6-a parto
Claude Gacond, 270-a radioprelego, 1968.12.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Okaze de la jubileo Mahatma Gandhi ni rakontas pri la restado de Gandhi en Svislando en 1931. Ni ĉerpas el la tagĵurnalo de Romain Rolland, ĉe kies vilao la hinda gvidanto restadis en decembro post la Konferenco de la Ronda Tablo okazinta en Londono.

A.- La pasintan semajnon ni konstatis la striktan obeadon de Gandhi al la Vero. Ni vidis, ke por Gandhi la Vero estas Dio. Kaj ni ankaŭ vidis, ke por la Mahatma, titolo signifanta Granda Animo, la rimedoj kaj la celo estas interŝanĝeblaj. En tio lia filozofio estas absolute originala. Por li la celoj ne pravigas la rimedojn.

Cl.- La absoluta obeo al la Vero kaj la abomeno por la duonveroj kaj mensogoj estas io pli revolucia, ol oni povas unuavide pensi. La konfliktoj, kiujn vekis Gandhi en Svislando, tion pruvas.

A.- Dum la publika mitingo okazinta en Lausanne la 8-an de decembro 1931 Gandhi ne timis publike riproĉi al du ĵurnalistoj ties mensogemon. Jen kiel tio okazis :

Cl.- « *Gandhi*, rakontas Romain Rolland en sia tagĵurnalo, *vipis la hipokritecon de du gazetoj de romanda Svislando : Le Journal de Genève kaj La Tribune de Lausanne*. Unu el tiuj gazetoj raportis parolojn de Gandhi prononcitaj en la mitingo okazinta en Parizo, kaj donis al ili signifon diametre kontraŭan al la vero. La alia gazeto provis kredigi, ke Gandhi kaŝas parton de sia penso. Per subkomprenajoj metitaj en lian buŝon ĝi provis pruvi, ke la hinda gvidanto antaŭvidis kaj antaŭakceptis la taktikon de perforto, post kelktempaj uzo kaj elprovado de la neperforto.

A.- Ambaŭ gazetoj klopodis prezenti Gandhi kiel naciiston, kiu kaŝas sian ludon.

Cl.- *Gandhi*, skribis Romain Rolland, *nete diris, ke tio estis malhonesto fabrikado, ke li ne dubas pri la honesteco de la direktoro de la ĝeneva gazeto, sed ke la devo de tiu direktoro estas trakti sian korespondanton kiel nefidelan funkciulon, devigante lin konfesi sian mensogon.*

A.- *Tiam la publiko de Lausanne bruege aplaŭdis, dum la koleregaj ĵurnalistoj forlasis la ejon klakante la pordojn. »*

Cl.- Aŭdante tion per la radio-dissendado, Romain Rolland tuj pensis pri la sekvoj. Ni redonas al li la parolon : « *Oni povis antaŭvidi, ke la svisa gazetaro, kiu ĝis tiam raportis pri Gandhi kun konsidero, ŝanĝos sian sintenon ekde la morgaŭo. Tion ĝi faris, sed laŭ ironia tono ankoraŭ mezurata : ĉar la kverelo atingis nur du apartajn ĵurnalojn. Tute alia estos ĝia instrukcio la morgaŭon de la publika mitingo okazinta en Ĝenevo, la ĵaudon. Sed ni ne anticipu !*

A.- *La merkredon 9-an de decembro – la mateno estis rezervita de Gandhi por aŭdiencoj, kiujn li konsentis al petantoj. Pri tiu temo Romain Rolland mencias, ke la vesperon de sia alveno, la dimanĉon, je la 9-a vespere, Gandhi akceptis dekduon da ĵurnalistoj, kaj ke ĉiuj montriĝis senlime stultaj : neniu el ili kapablis fari eĉ unu solan inteligentan demandon. Tiu fakto havis negativan influon super Gandhi. Li sin faris malbonan ideon pri la informado en Svislando.*

Cl.- *Dum la posttagmezo Gandhi faris veturon al la valdaj Alpoj. Li deziris viziti en la vilaĝo Le Sepey oldan kamparaninon, kiun foje renkontis Mira. Tiu kamparanino ŝpinis kiel hinda kamparanino. »*

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 6-a parto
Claude Gacond, 270-a radioprelego, 1968.12.11 & 14

A.- Jen kiel Romain Rolland priskribas tiun aŭtomobilan ekskurson : « *Do ni organizis aŭtomobilan promenadon, kaj ni profitis la okazon por poste konduki Gandhi al Leysin, por ke li vizitu la universitatan sanatorion de la kuracisto Vauthier. Gandhi esprimis malmulton pri la sanatorio por intelektuloj, - krom la admiron de la pureco, kiu en ĝi regis. Estas la sola rimarko, kiun li faris. Sed lin ĉarmis la vizito al la olda kamparanino. Li trovis sin ŝpinanta, kaj li sidiĝis antaŭ la ŝpinilon kun ŝi por babilado. Najbaras la ĉambron la stalo kun siaj kaprinoj kaj du bovidoj. Li sin kredis en Hindio, kaj diris, ke ĉio estas simila. La oldulino, kiu ne antaŭsciis pri la vizito, estis kontentega, sed ne surprizita. Kune ili ridis kaj pepis kiel infanaj gekamaradoj. »*

Cl.- Gandhi estas nelacigebla. Post la reveno en Territet, li vizitis Romain Rolland por tria interparolado. Tiun vesperon la franca verkisto estis iom malsana kaj lacega. Pro tio tiu babilado ne estis tre interesa. Kaj Romain Rolland konfesas en sia ĵurnalo :

A.- « *Mi havas tiun ĉi tagon la impreson, ke la vojo de Gandhi estas tiel nete desegnita, kaj – por multaj aĵoj – tiel diferenca de la mia, ke ni ne havas multajn diskut-temojn. Ĉiu ekzakte scias, kien li iras, kaj la vojo de Gandhi estas perfekta por li kaj por liaj kunuloj ; mi ne volus, ke ĝi estu alia. »*

Cl.- Tiun interparoladon konkludigas Romain Rolland je la sesa horo vespere per la deziro ĉeesti la vesperajn preĝojn. Ni reparaoligas la verkiston :

A.- « *Gandhi volas, ke la preĝoj okazu en mia salono, en la teretaĝo de la vilao Olga, tio por eviti al mi eliron tra la ĝardeno. »*

Cl.- Gandhi loĝas en la najbara vilao Lionette, kiun posedas la fratino de Romain Rolland.

A.- Ni ree citu Romain Rolland : « *Kaj je la 7a horo Gandhi revenas, sekvata de kunirantaro de amikoj kaj disĉiploj, hindoj kaj eŭropanoj. La ĉeestantaro kaŭriĝas sur la plankon (krom mi, mia fratino kaj Marie, kiuj sidas sur la divano). Gandhi estas kontraŭ la biblioteka niĉo, sub la acoraj skulptaĵoj el kuirita argilo ; Mira preskaŭ tuŝas miajn genuojn ; la aliaj trovis lokon kontraŭ aŭ sub mebloj. Oni estingas la elektron. Kaj la belaj kantoj rekomenciĝas. Poste Gandhi reiras al la vilao Lionette, kaj la ĉeestantaro disiĝas. »*

Cl.- Legante la tagĵurnalon de Romain Rolland oni konstatas, ke la gastigo de homo kiel Gandhi ne estis facila afero. Unue Gandhi estas moviĝema gasto, due li ne hezitis konstante diri sian vidpunkton, eĉ se li sciis, ke tiu ĉi diro vekos malagrablajojn, trie, kaj eble la plej laciga afero, vasta kunularo ĉirkaŭis lin. Gandhi estis kapabla vivi kaj eĉ mediti ĉirkaŭata de amikoj, gastoj, disĉiploj, vizitantoj. Romain Rolland kontraŭe estis, kiel ĝenerale la eŭropaj intelektuloj, solulo, kiun rapide lacigas la komuna vivo. Ambaŭ homoj estis pli faritaj por perkoresponde interrilati, ol por longe kunvivi.

A.- La venontan semajnon ni vidos, ke la mitingo en Ĝenevo vekis en Svislando kontraŭstaron al pli longa restado de Gandhi en Svislando.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-